

BRAZILA ESPERANTISTO

68-a Jaro

Majo-Aŭgusto 1974

n-ro 722-725

Oficiala organo de **Brazila Esperanto-Ligo**, Societo de publika utileco (dekreto N. 4356, 26 Oktobro 1921). Jarabono eksterlande: 15 respondkuponoj. Sidejo: **Praça da República, 54, 2.º**

Telefono: 232-6309 — RIO DE JANEIRO — BRAZIL

Respondeca redaktoro (redaktor principal): **Luiz A. B. Martins**



D-ro Carlos Domingues
5. Majo. 1896 — 22. Februaro. 1974

LATINAMERIKA KRONIKO

Venezuelo

Caracas - En Julio 1973 aperis la unua numero de "Venezuela Stelo" redaktita de S-ro Félix García Blázquez. "Venezuela Stelo" estas la oficiala organo de Venezuela Esperanto-Asocio.

- En Novembro 1973 estis elektita jena estraro de Venezuela Esperanto-Asocio: Prez. Ing. Félix García Blázquez; Vicprez.: Prof. Octavio De Diego; Gen. Sekr. Prof. Juan Eduardo Bachrich; Kas.: S-ro Manuel Nebra Val; Vickas.: S-ro César Manzano; Bibl.: S-ro Leo Di Francesko.

Meksiko

Tijuana - De la 5-a ĝis la 7-a de Aprilo lasta okasis la Esperanto-Pacifika Konferenco kun la partopreno de 70 geeesperantistoj. Temo: "Informado pri Esperanto".

LA NOBLA KORANO

Texto paralelo em árabe e
em Esperanto Cr\$ 112,00

QUOTA ANUAL DE ADESAO A LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO

	Cr\$
M 1 — além das vantagens de sócio, recebe a carteira e o <i>Brazilia Esperantisto</i>	35,00
M 2 — recebe o mesmo que o M1. Paga uma quota mais alta para auxiliar a B.E.L. e o movimento	70,00

Essas quotas correspondem ao ano civil

Taxas dos Cursos

<i>Curso Elementar</i>	<i>Contribuição única:</i>	120,00
50% desse valor deverá ser remetido com o pedido de inscrição; o restante, com a remessa da 6.ª lição.		

<i>Curso Superior</i>	<i>Contribuição única:</i>	200,00
50% desse valor deverá ser metido com o pedido de inscrição; o restante, com a remessa da 10.ª lição.		

<i>Curso Magistral</i>	<i>Contribuição única:</i>	300,00
50% desse valor deverá ser remetido com o pedido de inscrição; o restante, com a remessa da 15.ª lição.		

Todas as importâncias devem ser remetidas em cheque pagável no Rio de Janeiro à

LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO
PRAÇA DA REPÚBLICA, 54, 2.º
Rio de Janeiro, GB

ESPERANTA PORTUGALA PROVERBARO

L. L. Zamenhof — A. Couto Fernandes

Coleção de provérbios correspondentes em Esperanto e Português.

Classificados em 222 grupos, com índice alfabético nas duas linguas.

A obra é completada pela peça de Artur Azevedo "Amor por Anexas" com texto bilingue (trad. de A.C. Fernandes)

14,5 x 19 cm, 168 pág. Cr\$ 8,00

A Imagem, a Alma, o Símbolo

Mário Ritter Nunes

Lá vem ele... lá vai ele... aqui perto e lá longe... vai e vem... vem e vai... Passos miúdos de poucos centímetros e apressados, de quem deseja chegar mais depressa do que pode... nos espaços da rua e nos destinos do tempo.

Dia veio e passou dia, meses e anos e a vida inteira passou. Uma vontade, um sonho, um ideal, um apostolado o levavam a ver o que os que veem não viam. Na noite de seu pouco ver, ele sorria para um verde mais bonito que todos os matices verdes da Esperança; para uma estrela branca da Paz mais branca que todas as brancuras reunidas. Divisava sempre, encantava-o e lhe animava o espírito uma linha e tremulante bandeira do Esperanto.

Ah! Dr. Carlos Augusto Guimarães Domingues, como o Esperanto movimentava sua vontade! como fazia forças de sua fraqueza! como encheu de mocidade sua velhice!

Em 1919 ingressou para o movimento esperantista com 23 anos de idade. De imaginação e zelo incendidos, ali encontrou e fez-se companheiro e baluarte de Backheuser, Porto Carreiro, Ismael Braga, Melo e Souza, Dona Balbina, Goianás, Dona Edith, Viana Peixoto e, reunindo quantos mais, do querido São Alberto Couto Fernandes. Quanta gente boa que foi viver no Céu a confraternização por que tanto em vão lutaram na Terra! Foram-se, mas também ficaram conosco. Milagre do ideal...

Carlos Domingues viveu pelo, com e para o Esperanto. Sem jamais querer dele tirar proveito, ou por ele projetar-se, ou com ele beneficiar-se; fez-se e foi digno sucessor e continuador de Couto Fernan-

des na Presidência da L.B.E. Sensível à responsabilidade do comando, frequentou a Sede da Liga, no velho casarão da Praça da República, diariamente, a sol e chuva, com ou sem saúde, incompreendido ou prestigiado. De início e por muito tempo, via e se apoiava pelos olhos e braços de D. Irany — Dona Irany Baggi de Araújo. Depois... depois, ele mesmo pela solicitude de amigos... que sozinho não podia ruas e esquinas entrecruzar. Ninguém nunca jamais lhe ouviu leve queixa por ser obrigado a subir todos os dias ao segundo e terceiro pavimentos da tradicional "Casa do Esperanto".

Acrescida pela penumbra do salão-Sede, a penumbra de sua vista obrigava-o mais a cheirar do que ler (quantas vezes com auxílio de uma lupa) a enorme correspondência, jamais sem condigna resposta.

... e dava aulas, promovia e orientava cursos, estimulava iniciativas, prodigalizava tempo e gentilezas a quem o procurasse, cuidava do jornal e da emissão de diplomas e certificados. Afinal era o Presidente cuidadoso, esforçado, exemplar.

Aos 22 dias do mês de fevereiro do ano de 1974, já com 78 anos de idade, o herói e mártir da causa não pode mais continuar na arena para combater o bom combate. Não mais o veríamos na terra...

Cometi, meu querido Dr. Carlos, a injustiça e a ingratidão de não comparecer na hora do adeus ao Amigo. Foi o seu fim? Não! É o seu princípio, porque bem disse o Mestre que são "Bem-aventurados os limpos de coração, porque eles verão a Deus".

E eram limpíssimos o coração e o ideal do Dr. Carlos Augusto Guimarães Domingues.

La batalinto ripozas

Je la sepa kaj duono matene, ni eniris en la sidejon de B.E.L. Estis vendredo antaŭ la Karnavalo. Ni sidigis ĉe la skribtablo por telefoni al la hejmo de D-ro Carlos, kiel ni faris ĉiumatene. La telefono sonoris antaŭ ol ni tuŝis ĝin. Lia familio komunikiĝis lian jusan forpason. Konsterniĝo. En nia kapo sin prezentis lia kvindekjara agado, kaj ni pensis: nun la batalinto ripozas.

Ĉirkaŭ la tagmezo ni sciigis pri la horo de la entombigo. Pro la proksimeco de la Karnavalo multaj amikoj kaj esperantistoj jam ne estis en la urbo. La enterigo estis kia li, simpla kaj modesta; familianoj kaj nur intimaj amikoj ĉeestis. Kun li malaperis tuta pionira generacio: Baggi de Araujo, Backheuser, Couto Fernandes, Cae-tano Coutinho, Porto Carreiro, Ismael, Mello e Souza, Irany. Al ili la brazila Esperanto-movado multe ŝuldas.

Carlos Augusto Guimarães Domingues naskiĝis en la 5-a de Majo 1896 en Recife, ĉefurbo de la ŝtato Pernambuco, kie li distingiĝis diplomigis pri Kontoscienco kaj Juro. Liaj gepatroj estis Francisco José Domingues kaj Maria Amélia Guimarães Domingues.

En 1919 la unuan fojon li venis al Rio de Janeiro kaj tuj kontaktiĝis kun la lokaj esperantistoj.

En 1926 kaj 1929 li ĉeestis la Universalajn Kongresojn de Esperanto okazintajn respektive en Edimburgo kaj Budapeŝto, kiel reprezentanto de la Brazila Registaro kaj de jenaj gravaj asocioj: Societo de Geografio, Komerca Asocio de Rio de Janeiro, Federacio de Brazilaj Komercaj Asocioj, Fe-

deracio de Brazilaj Skoltoj, Klubo de Inĝenieroj kaj Instituto de Kontoscienco.

En 1938 li transloĝiĝis definitive al Rio de Janeiro, kie li elstarigis kiel advokato, profesoro, ĵurnalisto, tradukisto, fonetikisto.

Advokato de gravaj firmoj, katedra profesoro en la Federacia Universitato en Rio de Janeiro, li instruis la portugalan lingvon en Kolegio Petro II, kunlaboris en multaj gazetoj kiel ĵurnalisto kaj sin dediĉis al Fonetiko.

Li gvidis en Eldonejo Irmãos Pongetti serion da historiaj kaj biografiaj studoj "Espelhos das Grandes Vidas", faris multajn kaj gravajn tradukojn en la portugalan lingvon: 1) el la latina: *Tractatus de Computis et Scripturis*, de Fra Luca Paciolo (Venezo, 1494); 2) el la germana: *Talleyrand*, de Franz Blei; *Danton*, de Herman Wendell; *O Vaticano*, de Joseph Berhart; *Bula Matari*, de Wassermann; el la angla: *Henrique VIII* de Francis Hacket; *Minha Terra e Meu Povo*, *Com Amor e Ironia*, *Entre Lagrimas e Risos*, *A Sabedoria da China e da Índia* (parte) de Lin Yutang; el la franca: *O Poder*, de Guglielmo Ferrero; *História da Inglaterra*, de André Maurois; el Esperanto: *O Rádio em 16 Palestras*, de E. Aisbeg (parte); en la hispana: *Zamenhof*, *Iniciador do Esperanto*, de Lopez Luna.

Li estis estrarano de Brazilia Societo de Geografio, de Instituto de Kontoscienco, de Brazilia Klubo "Esperanto", de Brazilia Esperanto-Ligo; li estis ankaŭ dumviva membro de Brazilia Gazetistara Asocio, redaktoro de la revuo de Brazilia Societo de Geografio, de la revuo de Instituto de Kontoscienco kaj de la revuo de B.E.L.

Li partoprenis en la organiza komitato de kvar brazilaj kongresoj de Kontoscienco, okazintaj en Rio de Janeiro kaj São Paulo kaj estis kunaŭtoro de la antaŭprojekto de la regularo de la Komerca Instituto, de la jaro 1931-a.

Li estis adjunkto de prokuristo ĉe la Konta Kortumo kaj katedra profesoro pri Procedura Juro ĉe la Fakultato pri Edonomio de la Federacia Universitato en Rio de Janeiro.

En la aĝo de 13 jaroj li ekkreis lingvon, kiam venis al liaj manoj lernolibro de Esperanto. Post la legado de la gramatiketo, li tute forlasis sian intencon por ellerni la Internacian Lingvon.

Kiam la unuan fojon Carlos Domingues vizitis la urbon Rio de Janeiro, li konatiĝis kun la tiama prezidanto de B.E.L., D-ro Couto Fernandes, kiu konstatis, ke li perfekte regis Esperanton.

Lia poresperanta agado jam datiĝas de tiu tempo.

En 1920 li estis sekretario de la organiza komitato de 6-a Brazila Kongreso de Esperanto, okazinta en 1921, poste ĝia sekretario, kiam li ricevis la diplomon de Profesoro Aprobata.

En 1924 en la 1-a Brazila Kongreso de Kontoscienco li proponis — kaj tio estis aprobata — projekton por enkonduko de Esperanto en la komercajn lernejojn.

En 1926 li estis elektita vicprezidanto de B.E.L., posteno kiun li okupis ĝis la morto de la prezidanto, D-ro Couto Fernandes, en 1946.

De 1926 li estis redaktoro de Brazila Esperantisto, kie li aperigis belajn ĉefartikolojn, krom tradukaĵojn kaj lingvajn artikolojn.

En 1932 li estis elektita mem-

bro de la Lingva Komitato, poste Akademio de Esperanto. De 1935 li estis Komitatano de U.E.A.

En 1946 Carlos Domingues estis elektita prezidanto de B.E.L. Li estis sindona kaj kompetenta esperantisto, multe kontribuis al la disvastigo de Esperanto en nia lando kaj al la respekto, kiun hodiaŭ nia kara lingvo ĝuas en la neesperantista medio. Li ĉiam sukcesis, ke la Nacia Registaro nomis diplomatiiston por reprezenti nian landon en la Universalaj Kongresoj.

Dum lia prezidanteco Brazilo gajnis du fojojn la Internacian Konkurson de U.E.A.

Li instruis Esperanton en gravaj organizaĵoj kiaj Supera Komerca Lernejo de Rio de Janeiro, Komerca Liceo de Komercoficista Asocio de Rio de Janeiro, Brazila Klubo "Esperanto" kaj ĝis sia morto li gvidis la Profesoran Kurson de B.E.L.

Sur la eldona kampo, kiel prezidanto de B.E.L., Carlos Domingues apogis eldonojn de verkoj an neesperantistaj eldonejoj; tiun ĉi fakton li konsideris signifoplena, ĉar ĝi atestis la rekonon de Esperanto kiel serioza afero fare de gravaj entreprenoj. Tial oni komprenas kial li alte taksis la publikigaĵojn de Brazila Instituto de Geografio kaj Statistikiko, Domo de Ruy Barbosa, Eldonejo Irmãos Pongetti, k.c. Tiel aperis Santos Dumont, *La Aerpioŝiro, Tipoj kaj Aspektoj de Brazilo, Statistika Resumeto, Por la Pli Bona Mondo, Ruy Barbosa, Zamenhof, Iniciador do Esperanto* kaj aliaj, kies publikigo ni multe ŝuldas al M. Ritter Nunes, Teixeira de Freitas, A. Jacobina Lacombe, P. Carreiro Neto, J. Joels, k.a.

Liaj ĉefaj tradukoj estas: *La Kafo*, Mário Rangel; *La Brasiko kaj la Kverko*, Rui Barbosa; *La Muelisto*, Machado de Assis; *Brazilo Anekdotaj*, H. Campos; *Maldolôa*, Ida Baccini. Tiun ĉi lastan ni repre-

sas en tiu ĉi numero.

Kiel ĵurnalisto li ĉiam uzis la okazon por informi pri Esperanto. Fama estas lia respondo al kontraŭesperanta artikolo de la grava verkisto João Ribeiro, publikigita en Jornal do Brasil, en 1932.

En 1952, en la XIII Brazila Kongreso de Esperanto, okazinta en Recife, li prezentis tezon pri Foneĵo pri Esperanto kaj la portugala lingvo. Resumon de tiu ĉi tezo ni publikigos en la venonta numero de B.E.

Li kunlaboris en la Enciklopedio de Esperanto (1-a eldono), Dicionário Português-Esperanto, Dicionário Esperanto-Português, kaj en la ĵus aperinta Internacia Komerca-Ekonomika Vortaro. Li lasis ne publikigita malgrandan vortaron Esperanto-Portugala kaj Portugala-Esperanto.

Li ankaŭ kunlaboris en "Antologio de Brazilaj Rakontoj" kaj kun Irani Baggi de Araujo li tradukis la romanon "La Mistero".

En la ĝenerala kunsido de B.E.L. okazinta en la 22-a de Decembro 1973, li estis plian fojon reelektita prezidanto. En la mateno de la 22-a de Februaro 1974, li faris la lastan spiron.

Brazilia Esperanto-Ligo ricevis multajn kondolencajn leterojn el nia lando kaj el eksterlando. El ili ni citas:

"Kun granda bedaŭro mi sciigis pri la forpaso de Prof. D-ro Carlos Domingues, multjara prezidanto de B.E.L., meritplena persono por la afero de la Internacia Lingvo kaj estinta komitatano de UEA.

"Mi afable vin petas akcepti en la nomo de U.E.A. kaj en mia propra la plej profundajn kondolencojn. Mi andaŭ petas vin transdoni niajn kunsentojn al la familio de la eminenta forpasinto." Ivo Lapenna, Prezidanto de U.E.A.

Mi eksciis de via letero kun granda ĉagreno pri la forpaso de

Maldolĉa

Ida Baccini

Mi ne scias kiel multaj el miaj lernantetoj sukcesis ekscii ke tiu tago estas mia naskiĝa datreveno. Mi vidis ilin alveni al la lernejo, festvestitajn kaj kun donaceto en la manoj. Iu portis al mi elegantan plumingon, alia meslibron, alia ilarujon, alia belan bukedon de freŝaj floroj.

Tiu sceno min konsolis kaj malĝojigis samtempe; ĝi min konsolis, ĉar ia esprimo de danko kaj amo, kiu alvenis al mi de tiuj bonaj infanoj, tuŝis mian koron kaj influis por ke mi trovu malpeza ĉiun suferon; ĝi min malĝojigis, ĉar mi pensis ke la mono elspezita per tiuj aĉetaĵoj povus esti uzata pli noble. Tamen mi ricevis serene tiujn karajn ampruvojn.

Nur unu knabeto, la plej malriĉa, donacis al mi nenion; sed

nia Kolego Domingues, via Prezidanto. Li estis tre helpema kaj tre klera homo, kaj la Akademio de Esperanto multe perdas ĉe lia malapero". G. Waringhien, Prezidanto de la Akademio.

"Kun ĉagreno mi legis el la letero de la 4-a de Marto ke via prezidanto, d-ro Carlos Domingues, forpasis.

"Mi, kiel redaktoro de la multlingva komerca-ekonomika vortaro, konservos plej bonajn rememorojn pri Prof. Domingues, kiu estis fidele, helpopreta kaj tre kapabla kunlaboranto al la vortaro, kies portugalan sekcion li prizorgis. Mi tutkore esperas, ke li ankoraŭ vidis la pretan vortaron, frukton ankaŭ de lia sindono." F. Munniksma.

Bedaŭrinde tio ne okazis; Parco venis la unua kaj tranĉis la fade non de lia vivo.

pro lia aspekto embarasita kaj pro lia ŝajno malĝoja mi imagis kiel li devus suferi. Mi alvokis lin kaj, kiam li troviĝis proksime, mi ofte lin ĉirkaŭprenis kaj kisis lin. Kuraĝitita per tiuj karesoj, la kompatinduleto metis en miajn manojn malgrandegan pakajeton kaj hontite forkuris. Suprizite, sci-vole kaj de neniu rimarkite mi ĝin malfermis. Ĝi estas... divenu... tri malgrandaj pecetoj da suke-ro !!

Mi revokis lin kaj....

- Kiu diris al vi ke mi ŝatas la sukeron ? mi demandis al li ridante.

- Neniu, li respondis, mi mem divenis tion ! Mi ankaŭ ĝin ŝatas tiom !

- Kaj vi, mi rediris kortuŝita, ĝin petis al via panjo? ...

- Ne, sinjorino, li tuj respondis, mi petis nenion al neniu. Mi rezervis la mian.

- Nu...

- Mia avino, donante al mi ka-fon kun lakto, metas ĉiam en mian tason tri malgrandajn pecetojn da sukero, por ĝin dolĉigi. Mi forprenis la sukeron.

- Kaj la kafo kun lakto ? mi de-mandis sentante la gorĝon premata.

- Mi trinkis ĝin maldolĉa !

Marjo, malgranda Marjo, kie vi estas? Eble la fumo de la fabrik-oj nigrigis vian anĝelvizaĝon, e-ble vi plugas la kampojn, kie la greno blondiĝas aŭ la vinbero ma-turiĝas je suno; eble vin akcept-is la ŝipoj aventuremaj, kie la laboro estas tiel trompanta... Sed, kio ajn vi estas, laboristo, ter-kulturisto aŭ maristo, via koro es-tas inter la noblaj koroj, por ki-uj amo estas sufero, abnegacio es-tas devo. Marjo, se vi povus dum momento, eniri en mian studĉambre-ton, vi vidus multe da libroj, mul-

O pronome "se" e a sua tradução

(súmula de uma preleção)

Carlos Domingues

I - O Esperanto é uma língua simples, mais simples que qualquer outra. Daí não se segue que seja possível sem estudo e reflexão dominá-lo completamente. Alguns desejariam que o Esperanto fosse facilímo, mas julgando facilidade a total semelhança com o idioma materno, que já conhecem ou pensam conhecer. A verdade é que, se o E. se assemelhasse inteiramente a alguma língua nacional, seria demasiadamente complicado, como são todas as línguas nacionais.

II - Uma das coisas que fazem o E. parecer difícil é a necessidade de passar para ele as idéias complicadamente expressas na língua a que cada um de nós está acostumado. Toda língua, como diz Meillet, é um sistema de hábitos. Não podemos sem esforço libertar-nos desses hábitos, para aceitar de pronto, as construções mais lógicas da língua internacional.

III - Um exemplo do que afirmo ocorre, dentre muitos outros casos, com o pronome "se". Este é sabidamente um ponto árduo da nossa gramática, em que se aprofundam os mestres da língua. João Ribeiro e Nascentes tratam minuciosamente

te da ludiloj; sed vi vidus ankaŭ, konservatajn en malgranda vitraklo ŝo, tri malgrandajn pecetojn da sukero, nomon, daton !

El itala lingvo traduk-is Carlos Domingues.

desse pronome. Carneiro Ribeiro consagra-lhe nada menos de 30 páginas dos seus alentados "Serões Gramaticais". Said Ali incluiu um capítulo sobre o pronome "se" nos seis que formam as "Dificuldades da Língua Portuguesa". Maximino Maciel e Júlio Pires atribuem a esse pronome 5 funções. O nosso samideano Sebastião de Albuquerque, num excelente trabalho gramatical, conta 6 funções, Sousa da Silveira 7, e Eduardo Carlos Pereira 6, que desdobra em 9.

IV - De tudo isso se infere que a passagem para o E. de um trecho português em que se encontre esse pronome, acumulador de tantas funções, não pode deixar de exigir especial cuidado. Nesta preleção, e sobretudo nesta sùmula, terei de ser forçosamente sintético. O assunto comportaria grande desenvolvimento, se me detivesse em certos pontos importantes e sedutores da evolução do idioma português. O meu intuito é mais modesto. Desejo somente chamar a atenção dos estudiosos do E. para que procurem sistematizar os estudos sobre diversos temas da gramática portuguesa, que tenham importância na tradução para o E.

V - Para ilustrar o trabalho, em vez de formular os exemplos, coligi na *VIVVINHA*, de Alencar, todas as frases em que aparece o pronome *se*, e confrontei-as com *La Vidvineto*, do mestre Porto Carreiro, Servi-me da edição Garnier de 1899, que conta 116 páginas e onde se lê o pronome *se* 348 vezes. A conjugação *se* figura 40 vezes. Dela, porém, não cogito, até porque não oferece maiores tropeços.

VI - Do estudo a que procedi, concluo que há 18 hipóteses que considerar. Enumero-as a seguir, indicando o número de vezes em que se verifica cada uma.

1ª Hipótese: *Construção diferente* (52 vezes). A tradução pode não reproduzir literalmente o original, e com isso fica naturalmente excluído o equivalente do pro-

nome. Logo no Capítulo I a expressão "as novas ruas que se abriram" foi vertida simplesmente por "*la novaĵ stratoj*". Evidentemente o tradutor achou desnecessário transpor a proposição adjetiva, que encerra uma idéia pleonástica. São também exemplos deste primeiro caso:

"Era essa calma sinistra que SE assemelha ao silêncio." - *Ĝi estis tiu peza sereneco simila al la silento*."

"Duas ou três vezes dera um passo para dirigir-SE àquela porta." - *Du aŭ tri fojojn li ekpaŝis directe al tiu pordo*.

"Antes de ter chegado ao lugar para onde SE dirigia." - *Antaŭ ol li atingus la celatan lokon*.

2ª Hipótese: *Verbo simplesmente* (102). Dá-se quando o equivalente em E. do verbo pronominal português é somente um verbo. Sucede isso principalmente com os verbos chamados essencialmente pronominais - *arrepender-se*, *queixar-se*, *atrever-se* - cujos equivalentes E. *penti*, *plendi*, *kuraĝi* - não vem acompanhados de pronome oblíquo.

"Diga-me de que SE trata." - *Diru al mi, pri kio temas*.

"Jorge conserva-SE na mesma posição." - *Georgo restis en la sama sintenado*.

"Recordou-SE de que D. Maria um dia lhe havia dito." - *Li rememoris, ke s-ino Maria iutage diris al li*.

3ª Hipótese: *Objeto directo com reflexividade* (39).

"Ao quebrar a rua voltou-SE ainda uma vez." - *Ĉe la stratangulo li ankoraŭfoje sin turnis posten*."

"Sentia-SE bastante desgraçado." - *Li sentis sin tre malfeliĉa*.

"Às vezes procurava convencer-SE da extravagância dessa afeição"

— *Kalkfoje ŝi penis konvinki sin pri la malsaĝeco de tiu korinklino.*

4ª Hipótese: *Objecto directo com reciprocidade* (4).

Como o pronome reflexivo não indica somente a *reflexividade* mas também a *reciprocidade*, ocorre a necessidade de distinguir este caso daquele.

"Ambos ficaram imóveis, olhando-SE." — *Ambaŭ restis senmovaj, rigardante unu la alian.*

"As nossas famílias SE visitam com muita frequência." — *Niaj familioj sin tre ofte vizitadas reciproke.*

"Duas almas a confundirem-SE num mesmo beijo." — *Kiam du animoj sin intermiksas per komuna kiso.*

Neste último exemplo a *reciprocidade* é marcada pela preposição *inter* usada como prefixo.

5ª Hipótese: *Objecto indirecto com reflexividade* (0). Este caso é raro em português, e realmente não se verifica na *Viuvinha*.

6ª Hipótese: *Objecto indirecto com reciprocidade* (1)

O que essas duas almas tinham necessidade de dizer-SE mutuamente." — *Kion tiuj du animoj bezonis diri unu al la dua.*

7ª Hipótese: *Objecto directo com reflexividade*, 2ª pessoa (1). Usando a língua portuguesa o tratamento de 3ª pessoa, que o E. logicamente transpõe para a 2ª, as hipóteses de 3 a 6 devem ser estudadas também com o valor de 2ª pessoa.

"Teme ver-SE condenado a sofrer o desprezo do mundo." — *Ĉu vi timas vidi vin kondamnita suferi la mondan malŝaton?*

8ª Hipótese: *Objecto directo com reciprocidade*, 2ª pessoa (0).

9ª Hipótese: *Objecto indirecto com reflexividade*, 2ª pessoa (1).

"Impôs-SE a si mesmo o castigo de sua antiga prodigalidade". — *Vi altrudis al vi mem la punon pro via iama malŝparemo.*

10ª Hipótese: *Objecto indirecto com reciprocidade* (0).

11ª Hipótese: *Reforço da reflexividade* (2). Querendo insistir sobre a identidade do agente com o paciente, usa-se o prexo *mem*.

"Suicidou-SE". — *Li memmortigis.*

"Matando-SE, o senhor rouba os seus credores." — *Memmortigante, vi priŝtelas viajn kreditorojn.*

12ª Hipótese: *Posse* (1). O pronomo pessoal tem às vezes valor possessivo, conquanto na forma reflexiva da 3ª pessoa o facto seja pouco comum.

"Os dois amantes apertaram-SE as mãos". — *La du geamantoj interprenis siajn manojn.*

13ª Hipótese: Mudança de estado (97). Saïd Ali mostra perfeitamente a diferença entre os dois tipos de frases: "Pedro, querendo matar-se, só conseguiu ferir-se" e "Pedro, atravessando o jardim, feriu-se nos espinhos das roseiras": *vundi sin e vundiĝi*.

Geralmente os gramáticos não dão muito por essa diferença, que, pelo contrário, os esperantistas devem atentamente considerar.

"Como se enganava!" — *Kiel ŝi trompiĝis!*

"Enquanto seu companheiro falava, Carlos se tinha tornado lívido". — *Dum lia kamarado parolis, Karlo palegiĝis.*

14ª Hipótese: *mudança de estado com reciprocidade* (0). São as construções do tipo das de *interkompreniĝi*, *sin kompreni reciproke*.

15ª Hipótese: *começo de estado* (4). Ensina o Plena Vortaro: "como a passagem a um novo estado não se distingue facilmente do começo desse novo estado, pode-se indiferentemente usar o prefixo "ek" com o mesmo sentido de "iĝi", junto aos verbos intransitivos.

"Jorge ergueu-SE calmo e sossegado". — *Georgo ekstaris serena kaj trankviligita.*

16ª Hipótese: *voz passiva* (11). É a chamada passiva reflexa.

O problema SE resolveu simplesmente. — *La problemo estas facile solvita.*

"Serviu-SE o jantar." — *La vespermanĝo estis alportita.*

17ª Hipótese: *índice da indeterminação do sujeito* (32). O português não tem, como tem o francês ("on") e o alemão ("man"), pronomes próprios para indicar o sujeito indeterminado. Como já fazia o latim, usa-se nesse caso a forma passiva, a passiva impessoal.

"Sofre-SE, mas sente-SE quase uma consolação em sofrer." — *Oni suferas, sed oni preskaŭ sentas konsolon, suferente.*"

Desta forma podem ser vertidos também os casos enquadrados na hipótese 16ª, se se quiser acentuar a actividade do verbo.

"Outras vezes ouvia-SE um tiro". — *En aliaj okazoj oni aŭdis pafon.*

18ª Hipótese: *expletivo* (1). A tradução de expressões com o pronome expletivo depende da significação que se atribua ao pronome.

"Quando levantava a vista das cartas, era para sorrir-SE de satisfeita e feliz." — *Kiam ŝi lev- is siajn okulojn, ŝi ridetis al si mem, ĝoja kaj feliĉa.*

"Al si mem" traduz aqui o expletivo. Às vezes o significado da palavra expletiva carece de importância e pode deixar de ser tomado

em consideração ao traduzir.

VI - Para terminar, mais alguns trechos da *Viuvinha* com a tradução:

"Jorge ergueu-se precipitadamente, e achou-SE em face do homem que se opusera à sua vontade de uma maneira tão brusca." — *Georgo rapide starigis kaj sin trovis antaŭ la homo tiel malmilde kontraŭinta lian volon.*

"O mal pode ocultar-se, o bem SE revela sempre." — *La malbonon oni povas kaŝi; la bono estas ĉiam malkovrata.*

"Todas as pessoas levantaram-SE, pois, e SE dispuseram a retirar-SE." — *Ĉiuj personoj levigis, do, kaj pretigis por foriri.*

VIII - Estimarei que este estudo sumário desperte o gosto de trabalhos semelhantes, que poderiam ser feitos, por exemplo, com "Tipoj kaj Aspektoj de Brazilo", "Antaŭ du mil jaroj", "Amo per proverboj", tomando-se como base os pontos da língua portuguesa, cuja passagem para o E. apresentasse dificuldade resultante das nossas formas idiomáticas.

* anonceto

* Dez. kor. kun brazilanoj: Beleznaĵoj, 2800 Tatabánya, Győr u. 16. Hungarujo.

* Carlino Otalvarino, Ayacucho, 29-54, Medellin, Kolombio, dez.korrespondi.

* Du dekkvarjaraj knabinoj dez. kor. kun samaĝaj junuloj: F-ino Kovacs Klara, 7629 Pecs, Korvin Ottó u.8. - Hungarujo; F-ino Kejar Erika, 7629 Pecs, Furst Sandor ut 77-Hungarujo.

* Kiu estas "La homo kiun militonj aŭskultas"? Petu la senpagan 112-paĝan libron ĉe Esperanto-Misio, Box 7, Östansjö, S-694 02 Hallsberg 2, Svedujo.

SUBJEKTIVAJ NOTOJ PRI VOJAĜO ĈIRKAŬ LA MONDO (2)

Claude Piron

En Edeno

Denove mi flugas super vastego da bluo. Saluteton al Paska Insulo, kaj ni alteriĝas je la sono de dolĉa muziko tahitia. Ĉi tie estas la Edeno. Nenio estas malbela sur ĉi tiu benata insulo. Meze de la verdaĵo, jen palma, jen bananarba, vigletas trankvila urbeto kun ridetanta logantaro diversrasa: polinezianoj, francoj, ĉinoj. Portisto — imagu ! — rifuzas trinkmonon. "En Tahitio, sinjoro, trinkmono ne ekzistas". Altan vivnivelon proklamas la multaj aŭtoj, motorcikloj kaj motor-skutiloj, kaj ankaŭ vidaĵoj eble unikaj en la mondo, kiel tiu tahitiano, kiu sur la straro kviete trinkas ĉampanon senglase, el la botelo mem. (D-ro Laigret, estro de la san-servoj en Franca Polinezio, al mi klarigos poste, ke la alkoholismo minacas fariĝi unu el la problemoj, kiun kaŭzas la rapide altiĝanta vivnivelo).

Dimanĉon matene mi ekflu

gas refoje, kaj, post nur kelkaj horoj, alvenas al Nov-Zelando lundon: ni trapasis la Internacian Datan Linion kaj en unu sekundo maljuniĝis je unu tago (ĉi tio kompensas la ripetatan gajnon de horoj, kiun oni profitas vojaĝante okcidenten).

La ĉarmo de Velingtono ne estas ekzotika. Oni tujsentas sin kvazaŭ en Eŭropo, ne tro suda, ne tro orienta Eŭropo, eble eĉ ne kontinenta Eŭropo (ili veturas maldekstre), kaj tamen ĉi tio ne estas Britujo. Kelkrilate ĝi estas prestaŭ usona: tiuj lignaj domoj, plejofte blankaj, kiuj konsistigas la grandan plimulton de la loĝejaro, tre similas siajn nordamerikajn kuzojn. Sed ĉi tiuj tegmentoj el verda, griza, ruĝa, blua ondolado ne estas specife nov-zelandaĵoj? Tegolaj tegmentoj ja ne taŭgus en tertrema zono. Ankaŭ la homaj kontaktoj estas malsamaj ol en la ĉefaj aliaj anglolingvuoj, ili situas laŭ mi en tre plaĉa meza punkto inter la formaleco-distancedo de la britaj kaj la trofamiliara, trorapida-amikeco de la usonaj. Eble Nov-Zelando impresis min per tia provinca ĉarmo. Nenio en ĝi estas giganta, kaj mi dubas, ĉu la novaj nubskrapuloj, kiuj elŝprucas el la tero ekde kiam la teknika

progreso ebligis al la aŭtoritatoj permesi altan konstruadon sen timo pri ter-tremaj katastrofoj, vere respondas al la profunda deziro de la novzelandanoj.

Grandan dankoŝuldon mi havas al la velingtonaj esperantistoj. Ges-roj Adcock akceptis min kiel membron de la familio, kaj same ges-roj Hill, dank' alkiuj mi konatigis kun aliaj esperantistoj, S-ro Potta, unu el tiuj fenomenaj personecoj, kiujn oni renkontas nur en Esperantujo, homo, kiun oni aŭskultus dum horoj babili pri la lingvo, la literaturo, la arto tra duki aŭ mil aliaj interesaj temoj, kaj kiu mastras la internacian lingvon en malofte atingita grado. Lia persona vortaro angla-esperanta, bedaŭrinde tro ampleksa por publikigo, estas monumenta verko, kiu trovas dignan lokon nur en universitata biblioteko aŭ en kultura centro de simila nivelo.

Post lasta tago, dum kiu Prof. Adcock konigis al mi tipajn pejzaĝojn: marbordo, montoj kovritaj de densa al mi tute nekonata vegetaĵaro, herbejoj, kie sennombraj ŝafoj, vaste disigitaj, ĝuas ŝajne senliman spacon..., kaj post simpatia vespero en la ve-

lingtona Rondo esperantista, mi min retrovis en aviadilo direkte al Sydney, Aŭstralio.

Sed Sydney ne estas Aŭstralio, kaj veturado ekster urba min kondukos, tra kelkaj el tiuj verdaj zonoj, kie, pro saĝa malpermeso konstrui, la naturo disvolvas sian belegan sovaĝecon, jen al plaĝoj kun preskaŭ orangkolora sablo, jen al dolĉa riverbordo, kie alternas arbaroj kaj ĝardenoj, jen al parko, en kiu libere saltas kanguruoj, dum dormas sur arba branĉo forko la aminda koalao, simila al pluŝa ludbesto.

Sydney estas novjorkeca urbego; altegaj konstruaĵoj, largaj vojoj trafikplenaĵoj, brikaĵoj domoj, polveroj, kiuj dolorige trafas rekte la okulon, kaj diversnacia laboristaro. Vespere, en mia hotela kvartalo, viglas nokta vivo, kaj la pornografiaj librejoj plenplenas je avida foliumanta faŭno.

En la plej

proksima numero:

Al Mistera Singaporo.

ESPERANTO

NO ESTRANGEIRO

Alemanha - O "Comitê Diretor da Liga Internacional de Mestres Esperantistas" designou o Prof. Dr. I. Szerdahelyi presidente da Comissão Organizadora para outorga do certificado no Exame Pedagógico Internacional. A Comissão tem por fim elevar e unificar internacionalmente o nível de ensino do Esperanto nas escolas. Os professores que desejarem submeter-se ao exame devem dirigir-se ao presidente da ILEI, Sr. Helmut Sonnabend, D/3161 Dollbergen, Im Eckerkampsfeld 11a., Alemanha Ocidental.

Austrália - O Diretor da "Walgett High School" escolheu para o emblema da escola um mote em Esperanto. Diz o mote: "Nenio sen la boro".

Áustria - A Liga Austríaca de Esperantistas Cegos publicou um relatório sobre dois encontros com seus colegas iugoslavos, para a prática de um dos mais importantes esportes de inverno: o esqui. Durante o certame, realizaram-se cursos, brincadeiras, repouso e até um concurso de corrida em esquis. "Balias vivas", construídas de

pessoas dispostas ao longo da pista, orientaram os cegos participantes. O encontro foi amplamente noticiado pela imprensa dos dois países.

Polônia - Inaugurou-se em junho passado em Szczecin o Café Esperanto. O estabelecimento dispõe de cardápio bilíngüe (Esperanto-polonês) e um centro de informações, também bilíngüe, para divulgação dos eventos esperantistas em todo o mundo.

Suécia - A Associação de Turismo da Costa Ocidental acaba de editar um prospecto sobre Gotenburgo, com mapas e informações em Esperanto, obtido gratuitamente no seguinte endereço: - Oficejo de Turismo, Parkgatan 2, S-411, 38 Gøteborg, Suécia.

Internacia

Esperanto-Instituto

En la tridekaj jaroj fondiĝis en Hago la "Internacia Esperanto-Instituto" sub la gvidado de S-ino Isbrücker kaj S-ro Cseh, kiuj eldonis la revuon "La Praktiko" - la gazeto kiu instruas kaj amuzas - kiu ne plu aperas. Sed pro la morto de S-ino Isbrücker kaj la malsaniĝo de S-ro Cseh la aferoj de la Instituto malordigis.

Nun nova estraro decidis reordigi kaj revigligi la Instituton. Jen la adreso:

Diouwstraat 172
Hago, Nederlando

Recenzo

Malbona Lupo Reenkarniĝinta, Roque Jacintho. Desegnoj: Joel Linck. Trad. A. K. Afonso Costa. Rev. B. Silva. Eldono: Federação Espírita Brasileira. 20 p. 1973.

Se la publikigo de literaturaj verkoj estas malfacila pro la alta eldonkosto kaj pro la relative malgranda nombro da legantoj, la publikigo de porinfana libro, krom la menciitaj faktoroj, estas multe pli malfacila pro la postuloj de la legantetoj, kiuj ne kontentigas per malbelaspektaj libroj.

Tial kun granda admiro ni foliumis kaj legis la verketon "Malbona Lupo Reenkarniĝinta". Nur senprofitema institucio, kia Brazilo Spiritisma Federacio, kuraĝas eldoni tiun ĉi belan, allogan broŝureton plenan de koloraj desegnoj, kiu povas fiere stari apud similaj nacilingvaj verkoj.

La historio komenciĝas de la momento kiam la Malbona Lupo englutas la avinon de Ruĝa Ĉapeto. Ekde tiu ĉi okazaĵo, surbaze de la spiritisma doktrino, la libro prezentas moralan kristanan instruon, en simpla kaj facila stilo.

Ni ne povas ne rekomendi tiun ĉi libreton al la esperantistetoj ĉefe spiritistaj, kiuj nepre ĝuos la legadon kaj la presantan prezenton.

L.A.M.

BIBLIOGRAFIO

Modela Prononco de la Interlingvo Esperanto. Represado el Sciencia Revuo. A. Lienhardt. Beograd,

Iugoslavio. 1973.

Traktaĵo celanta servi kiel lernilo pri modela prononco de Esperanto.

o0o

La Vojo al Nirvano aŭ la Dhammapado. El la Pali tradukis kaj komentariis T.T. Anuruddha. Eld. de Bô-Tât-Csoma-Instituto por Buddhologio, P.O. Box 34, Vung-Tau, S. Vjetnamio.

Ĝi estas resumo de solenaj diraĵoj de Gotama Budho.

o0o

Nudaj inter Lupoj, Bruno Apitz. Trad. el la germana originalo D-ro Karl Schulze. Lingva kontrolo de Jerzy Grum. Romano. Edition Leipzig. 1974. 480 p.

Interesa romano pri la Koncentrejo Buchenwald kelkajn tagojn antaŭ la fino de la Dua Mondmilito.

ZAMENHOF

INICIADOR DO ESPERANTO

Biografia em português . . Cr\$ 8,00

Associação Portuguesa
de Esperanto

É a seguinte a nova diretoria da Associação Portuguesa de Esperanto (A.P.E.): Presidente: Dr. Eduardo Marinho Alves Moura; Vice-Presidente: Adolfo Augusto Nunes; Primeiro Secretário: D. Olga Serra Almeida; Segundo Secretário: Jaime de Matos Correia; Tesoureiro: Antônio Ribeiro da Cruz; Vogais: D. Maria Luísa Niny Mexia, Dr. Alcinda de Carvalho, D. Maria Amélia do Amaral M. Nunes, Cap. José dos Reis Pires e Glicírio de Moraes Ra belo.

Gramatiko:

kiel ni
diru ? Kiel ni ne
diru ? Lingvaj
Konsiloj de D-ro
Johano Hamvai.

Ĉi-foje ni parolu ĝenerale pri la lingvouzo kaj kutimoj.

Ni, esperantistoj, ĉiuj konsentas, ke nia lingvo jam ne plu estas "planlingvo" sed efektive vivanta same, kiel ĉiu nacia lingvo. Sed samtempe tio signifas, ke ĝi kiel ĉiu vivantaĵo, kreskas, evoluas. Kompreneble la esenco restas ĝia fundamento, kaj ĝi devas resti ĉiam firma kiel la radikoj de la arbo, kaj ankaŭ ĝi ricevas novajn branĉojn, foliojn — etajn ŝanĝojn — laŭ la bezono.

Mi akcentas: "laŭ la bezono", kaj kun mi multaj gesamideanoj konsentas. Ĉi tie mi pensas unue pri la enkonduko de novaj, neologismaj vortoj. Ĉi tiu demando estas kaj restas ĉiam impete diskutata.

Tion ĉiu prudenta homo konsentas, ke en la nuntempa, moderna vivo konstante estas bezonataj ankaŭ novaj vortoj. Sed en Esperanto, ki u estas kaj volas esti facile lernebla kaj alproprigebla lingvo, la granda demando estas "kiam" kaj "kiom" da novaj vortoj ni devas envicigi en nian vortaron ?

Ĉi tiu demando estas tiom ampleksa, ke neeble estas pritrakti ĝin en la kadro de malgranda artikolo. La subskribinto ĉi tie denove esprimas nur sian propran opinion: oni estu tre atentemaj pri la uzado de neologismo ! Ni lasu la plej multajn neologismojn por la uzado de la poetoj kaj literaturistoj.

Jam antaŭ du mil jaroj diris la malnovaj romanoj, ke al poeto multo estas permesate, kio ne estas al ordinara homo, esprimante tiel: poetica licentia = permeso por poeto (sed nur al li).

Verŝajne nur tre malmultaj el ni parolas tiel en la ĉiutaga konversacio (almenaŭ ne mi):

- Mi estas jam olda homo kaj tial mi estas mulfoje acerba kaj aŭstera. Tamen mi ŝatas, se la junaj homoj ne estas bruskaĵ kontraŭ mi. Mi desidegnas la mavajn kaj folajn personojn kaj la lascivajn legaĵon. Bedaŭrinde la ĉipaj magazenoj plej ofte ne estas aliaj, ol sordida, nocanta fattraso, stinkanta.

Mi povus daŭrigi ĉar, (pardonu min la tre estimataj kaj altrespektataj aŭtoroj!) la nombro de la proponi(a)taj neologismoj momente jam atingas kelkajn centojn, sed se ni tiel progresas, baldaŭ, post kelkaj jaroj ĝi atingos milojn ! Ni ne devas alian fari por konvinkigi pri tiu ĉi aserto, nur kompari niajn malnovajn kaj novajn vortarojn. Kaj pro tio mi demandas estimplene: *kien Esperanto ?*

Kiel ni varbos tiamaniere adeptojn por la "facila internacia lingvo" ?

La aŭtoroj devus ĉiam havi antaŭ siaj okuloj la fakton, ke Esperanto estas fakte "demokrata" lingvo, t.e. ĝia adeptaro rekrutiĝas plej grandparte el la normalaj, generalaj civitanoj, kiuj nur en malgranda proporcio havas tian altan edukon, ke facile povus digesti la centojn da neologismoj devenintaj ne nur el diversaj eŭropaj lingvoj, sed el la sanskrita, hebrea, greka, ĉina, japana kaj aliaj lingvoj.

Antaŭ nelonge mi legis en nia bonega, gvida magazeno, ke la esperantaj libroj eĉ nun aperas en treege malalta nombro kaj eĉ tiam

KONVERSACIO

(XIV)

Koordinatoj

- Sed, imagaj linioj, al kio ili utilas ?

- Same kiel la karteziaj koordinatoj, en geometrio, ebligas difini punktojn en ebena, la geografiaj koordinatoj ebligas biri punkton sur la Tera surfaco.

- Kiel tio rilatas al koordinatoj ?

- La linio, ĉirkaŭ kiu rotacias la Tero — la terakso — estas nekonfuzibla, kaj ĝi difinas du polusojn...

- La nordan kaj la sudan...

- Jes. Kun unu punkto de imaga cirkelo sur unu el la du polusoj oni povas tiri senfinan nombron da cirkloj, nomataj paraleloj, ĝis la ekvatoro, kiu duonigas la tersferon.

tre ofte okazas, ke nur 500-600 ekzempleroj vendiĝas eĉ el tiuj. Se oni forvendas (dum kelkaj jaroj) 2000 ekzemplerojn, tio estas jam "granda sukceso"!

Kial ? mi demandas kaj kun mi miloj da legemaj esperantistoj ! La respondo: ĉar mi ne povas ricevi tian literaturon, kian mi ŝatus legi, precipe beletron, sed nur tian, kia plaĉas al la eldonistoj ! Ĉi tie sin kaŝas la sekreto ! Bonvolu ankaŭ vi, Sinjoroj Eldonistoj, arangi unu "Gallup Poll" (publik-opinioesploradon) pri la deziroj de la esperantista publiko, kaj eldonu poste librojn, konforme kun ĝi ! Tiam, mi estas certa, viaj eldonnombroj estoj multoble pli altaj !

(El Nov-Zelanda Esperantisto, n-ro 369, 2-1973)

- Tion mi scias. Kaj tra la polusoj oni povas pasigi ankaŭ senfinan nombron de aliaj cirkloj, la meridianoj, unu el kiuj estas la origina meridianoj, ekzemple la Grenviĉa...

- Tre bone ! Ĉiu ajn punkto kuŝas sur la interkruciĝo de iu paralelo kun iu meridianoj. La anglaj distancoj inter la paralelo kaj ekvatoro — la latitudo — kaj inter la meridianoj kaj la grenviĉa meridianoj — la longitudo — ekzakte difinas la situon de la punkto sur la terglobo.

- Tre gave ! Sed ĉu por io alia ili utilas ?

Bone... Kvar paraleloj kun apartaj nomoj — arkta kaj antarkta cirkloj, tropiko de la Kankro kaj tropiko de la Kaprikorno — limigas partojn de la tersfero karakterizatajn de la ĝenerala temperaturo: du glaciaj zonoj, du mezvarmaj kaj la intertropika zono.

- Kaj la meridianoj ?

- La kvazaŭ daŭbo inter meridianoj 70° 30' U kaj 70° 30' E estas horzono, en kiu la horloĝa horo estas ĉie egala — la grenviĉa horo. Okcidenten kaj orienten de tiuj du meridianoj, ĉiu meridianoj distanca je 15 gradoj limigas alian horzonon, en kiu la horloĝo estas respektive unu horon pli frua kaj pli malfrua, ol en la antaŭa, ĝis la datlinio, kiu koincidas proksimume kun la 180° meridianoj.

G.P.

RUI BARBOSA

Biografia Eseo

Fernando Nery Trad em Esperanto de J. Joels. Esperanto modelar, elogiado pela crítica mundial Dados biográficos. Transcrição de textos escolhidos do imortal jurista e político.

Obra valiosa dos pontos de vista linguístico, jurídico e histórico

15,5 x 23 cm. 290 págs Cr\$ 10,00